La Juna Amiko
daŭrigas
sian
regulan
aperadon!
Legu sur p. 4!

LVP

PILO-PRESS
Internacia
Informservo

N-ro 19/77 - 9 majo 1977
Aperas ĉiusemajne

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## UEA-estrarkunsido

Rotterdam (pp/uea) - De la 15-a ĝis la 17-a de aprilo 1977 kunsidis en Rotterdam la estraro de Universala Esperanto-Asocio kaj traktis la asociajn aferojn, kiel Financojn, Centran Oficejon, Statuton kaj Regularojn, Universalajn Kongresojn kaj la Eksterajn rilatojn.

Laŭ resumo pri la estrarkunsido la financa rezulto de 1976 montras profiton de proks. 26 500 gld. - do preskaŭ la saman sumon kiel pasintjare. Ankaŭ la Universala Kongreso de 1976 donis tre kontentigan rezulton, nome profiton de proks. 37 000 gld.

La estraro notis kun kontento la bonan progreson jam faritan en la preparlaboro de la kongreso en Rejkjaviko, kiu aŭguras esti inter la plej interesaj de la lastaj jaroj. Ĝis nun aliĝis iomete pli ol 1000 personoj.

La Eksteraj Rilatoj estis unu el la pli gravaj temoj de la kunsido. La estraro decidis sendi reprezentanton de UEA al la konferenco pri la lingva problemo, kiun organizis la Eŭropa Komisiono en Luksemburgo komence de majo. La estraro aprobis la tekston de komentario pri la lingvaj aspektoj de la realigo de la Fina Akto, kiun akceptis la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo en Helsinki en 1975. La komentario estos sendita al la 35 subskribintaj ŝtatoj por ties konsidero kunlige kun la konferenco pri realigo de la Fina Akto, kiu baldaŭ okazos en Beogrado. La estraro ankaŭ aŭdis raporton de la Prezidanto pri liaj lastatempaj sukcesaj interparoloj ĉe Unesko kaj pridiskutis estontajn planojn sur tiu kampo.

## La prezidanto de UEA al Pilo-Press

La prezidanto de UEA, D-ro Humphrey Tonkin, sendis al Pilo-Press sub la dato de 28 aprilo 1977 jenan leteron:

"Kara sinjoro Pickel,

Mi deziras gratuli vin pro via bona prezento de la afero de la Manifesto de Lapenna. Mi fakte multe bedaŭras, ke li defektis tute bonan kaj indan tekston per tiaj aludoj al la internaj aferoj de la Esperanto-movado.

Mi kaptas la okazon gratuli vin denove pro via ĉiam tre bona kaj trafa informa laboro.

Kore salutas,

sign. Humphrey Tonkin".

Redakcia noto: Temas pri la informo en Pilo-Press n-ro 15/77 p. 4 sub la titolo "Manifesto 1977".

## Internacia Junulara Renkontiĝo

Paderborn (pp) - Kadre de la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Paderborn Germana Esperanto-Junularo arangos Internacian Junularan Renkontiĝon, de la 27-a ĝis la 30-a de majo. La partoprenkotizo por la programo, manĝoj kaj tranoktado (en gimnastikejo) estas 38 GM. Petu informojn de Germana Esperanto-Junularo, Riemekstr. 62, D-4790 Paderborn.

La partoprenkotizo sen manĝoj kaj tranoktado estas 8,- GM. Dum la renkontiĝo ankaŭ okazos lingvaj ekzamenoj.

## Nova konkurso de Pola Radio

Pola Radio anoncas novan konkurson por la eksterlandaj aŭskultantoj. 10-tagaj ekskursoj tra Pollando kaj valoraj objektaj premioj estas gajnotaj de aŭskultantoj, kiuj respondas al jenaj demandoj:

1) Kiajn proponojn prezentis la socialismaj ŝtatoj - membroj de la Varsovia Traktato, dum ilia bukureŝta konferenco en novembro de la 1976 j.? Kiel vi aprezas tiujn ĉi iniciatojn?

2) Kion vi opinias pri ebloj de internacia kunlaboro en Eŭropo en la sfero de la energetiko, transporto kaj protektado de la natura medio?

3) Kiel vi rilatas al la proksimiĝanta renkontiĝo de la sigelintoj de la helsinkia Konferenco pri la Sekureco kaj Kunlaboro - en Beogrado? Kion vi atendas de tiu ĉi renkontiĝo?

Respondo jam al unu el la supraj demandoj rajtigas partopreni en lotado de la premioj.

La respondoj estu sendataj al Pola Radio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Varsovio, Pollando, - en kovertoj signitaj per la devizo "Konkurso", ĝis la 15-a de junio 1977 j. (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultoj estos anoncataj en la dissendoj de la Pola Radio la 30-an de junio 1977 j.

## Radio Luksemburgo pri Esperanto

### Nova sukceso de pastro Kindler-Triksini

La 28-an de aprilo 1977 Triksini havis la unuan fojon la eblecon paroli pri la internacia lingvo en aktuala dissendaĵo de Radio Luksemburgo.
En intervjuo kun Rainer Holbe (kiu cetere estas bone konata ankaŭ al spektantoj de la Germana Televido) li povis babili pri la strukturo kaj la avantaĝoj de la dua lingvo por ĉiuj, pri la nuntempaj sukcesoj kaj la esperoj por la estonteco. La aŭskultantoj povis konvinki sin mem pri la klareco kaj beleco de la internacia lingvo: oni aŭdigis tri strofojn de Esperanto-kanto. Sur la disko Bêby Kohl kantas religiajn kantojn tradukitajn de Triksini.

Sed la plej granda sukceso: Radio Luksemburgo (RTL) invitis pastron Kindler nun veni ĉiujn ok semajnojn por informi la amikojn de la mondkonata sendostacio pri la novaĵoj el Esperantujo. Oni pripensos la eventualan aranĝon de regula Esperanto-elsendo, kiam Triksini havos sian Esperanto-Centron en la Grandduklando, en la "Eŭropa Ĉefurbo".

Triksini nun petas ĉiujan gesamideanojn, speciale gejunulojn el la tuta mondo, skribi al RTL - Radio Luksemburgo kaj peti regulan Esperanto-elsendon! Sed jen gravaj konsiloj de Triksini:

Ne skribu tro longajn leterojn! Ne priskribu la tutan historion de la Esperanto-movado! Ne uzu tro da verdaj steloj! Kaj skribu legeble sur bona papero. Ĉiam oni devas konstati, ke la impreso kiun faras multaj Esperanto-leteroj kaj poŝtkartoj, ne estas tre bela.

Sendu ankaŭ eltranĉaĵojn de la gazetoj kaj revuoj, en kiuj oni publikigas tiun informon, al TRIKSINI, Eŭropa Paroĥo, Poŝtfako 175, Luksemburgo, Luksemburgio. Tio helpus multe, baldaŭ realigi la planon pri Esperanto-elsendo!

*************

Anonceto

Bielefelda esperantisto serĉas samideanon cele konversacion kaj korespondadon. Interesuloj skribu al: S-ro Joh. Schalk Lipper Hellweg 32, D-4800 Bielefeld.

Opinioj - reagoj

Pri "Esperanto en Radio" n-ro 1/77

Antipodana reago

Hodiaŭ alvenis Pilo-Press N-ro 17/77, kune kun la N-ro 1 de "Esperanto en Radio." Vi petas la legantojn doni opiniojn.

Ni en malproksima Aŭstralio preskaŭ neniam povas aŭskulti la elsendojn de eŭropaj radio-stacioj. Pro tio via Esperanto-Revuo estas treege bonvena.

Mi estas la redaktoro de "Aŭstralia Esperantisto" kaj volonte mi povos presi, de tempo al tempo, elĉerpaĵojn, kiuj certe interesus niajn legantojn.

Sed: Komprenu bone, ke en Aŭstralio kaj Novzelando ne ekzistas laboristaj Esperanto-kluboj, nek katolikaj aŭ protestantaj Esperanto-kluboj.

Pro la fakto, ke niaj kluboj batalas por resti vivantaj, ofte nur kun 10 aktivaj membroj - kaj nur en la provincaj ĉefurboj - oni en Aŭstralio tute ne povas apartigi sin en diverstendencaj grupoj.

Certe, Esperantistoj ankaŭ ĉi tie estas aŭ neŭtralaj, laboristtendencaj, katolikaj aŭ protestantaj, sed tion ili estas ĉefe nur ekster la Esperanto-grupoj. En la E-Societoj mem, ili provas gardi severan naŭtralecon por ne disrompi harmonion inter tre malgranda membraro.

Kvankam "Aŭstralia Esperantisto" havas eble 350 legantojn, ni tamen devas observi la saman neŭtralecon. Tial komentoj pri por aŭ kontraŭ komunismo aŭ socialismo, ni devas ne presi. Tamen via artikolo "Pri la eklezia strukturo de Svislando" estus akceptebla.

Do: Laŭ mia opinio, presu 2 paĝojn kun politikaj komentoj kaj rezervu maj la 2 aliajn paĝojn por radio-komentoj pri kulturaj, geografiaj aŭ turisaferoj. Tio interesus "Antipodanojn" kaj ne kaŭzus skismojn. Eĉ ne gravas ke komentoj pri kulturaj aferoj tamen iomete havas politikajn nuancojn. Certe, se estas komentoj pri historiaj aferoj aŭ movadaj, tiuj estus tre bonvenaj.

La 5-an de majo, 1977

Herbert Koppel, 41 Byfield Street,
Reservoir, 3073 (Melbourne)
Aŭstralio

Aŭskultaj spertoj de d-ro J. Kondor

La programon de Vieno sur meza ondo (per mia Telkaradio), ĵaŭde, la 5.5. mi sukcesis kapti la unuan fojon tre bone, preskaŭ samloke, kie Radio Vatikana kaj Pola Radio estas kapteblaj....La programo estis eminentega! "Pri la patrin-tago" estis la temo, sed tiel lerte, ĉarme, agrable, ke mi ĝojus, se la programon ripetus Pola Radio, por ke pli vasta aŭskultantaro informiĝus pri ĝi......Bernon en la nova sendotempo (10-19,10 h) bonege mi kaptis la 4.5. unuan fojon. Sen ĝeno, sen perturbado! - Radio Vatikana estis hieraŭ iom pala, senkolora kaj parte ĝenata, perturbata....

Informo de la Esperanto-Redakcio de Radio Vatikana

Ĉar la Vatikana Radio kaj Radio Roma estas entute sendependaj, ne estas inter ili interkonsentoj. Do, senintence okazis kolizio de iliaj ondoj. Ni esperas, ke oni povos trovi kontentigan solvon. Por ni ne estas facile trovi alian momenton, ĉar ni estis la lastaj alvenintoj.

2.5.77/685 Radio Vatikana, Esperanto Redakcio

Al la legantoj! Volonte ni publikigas ankaŭ viajn spertojn pri aŭskultado de la Esperanto-elsendoj. Speciale bonvenaj estas raportoj pri aŭskultebleco en diversaj lokoj kaj landoj kaj ankaŭ komentoj pri la enhavo de la elsendoj.
Skribu do al Pilo-Press, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, FR Germanio.

Dua Interlingvistika Laborkonferenco

Paderborn (pp) - De la 26-a ĝis la 28-a de majo La FEoLL-Instituto pri Kibernetika Pedagogio kun-labore kun la GPI-Laborgrupo ILUS organizos la Duan Interlingvistikan Laborkonferencon kun projekt-rilata interparolo 1977/78. La konferenca temo estas "Lingvo-pedagogio kaj lingvotraduko".La celo de la konferenco estas priparoli kaj diskuti la du esplor-projektojn de la FEoLL-Instituto: Lingvoorientiĝ-instruado en la elementa lernejo surbaze de la Internacia Lingvo kiel didakte taŭga fremdlingva modelo kajKomputil-asista dokumentado kaj komputil-asista instruado pri klerig-scienco helpe de la Internacia Lingvo.
Adreso: FEoLL-Institut für Kybernetische Pädagogik, Postfach 1567, D-4790 Paderborn, F R Germanujo.

Pri JUNA AMIKO

Ĵus aperis la 1-a numero de Juna Amiko, jarkolekto 1977. En"ĝojiga sciigo de la redakcio" oni ekscias, ke Juna Amiko - dank' al la helpemo de diversnaciaj amikoj - per ĉi tiu numero komencas "novan epokon - epokon de regula aperigado". La dua numero 1977 aperos en septembro kaj la tria en decembro. La nova abonkotizo jara estas 5,- GM.

Abonojn akceptas Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, F R Germanio. La unua numero tuj estas liverebla. Do bv. tuj mendi per pago de 5,- GM!

Haveblas ankoraŭ la jam aperintaj numeroj de la tri antaŭaj jarkolektoj. Ĉiuj 9 numeroj kune kostas 9,- GM.

50-a Kongreso de SAT

Ĉu vi

deziras travivi kongresan atmosferon?

ŝatas valorajn prelegojn?

volas ĝui teatraĵon en Esperanto?

Se jes, venu al Augsburg, al la SAT-kongreso kiel gasto!

Petu aliĝilon de Hermann Schmid, Alte Reichsstr. 31 F, D-8901 Steppach aŭ de Gerhard Kunze, Panoramastr. 25, D-7290 Freudenstadt 1.

********************

Esperanto en Radio

DLF (Deutschlandfunk) Köln la 3-an de aprilo, je la 19,55 horo, en sia franclingva elsendo informis pri la apero de la Esperanto-traduko de la "Trigroŝa Romano". (Informis Reinold Huber, 3306 Lehre-Wendhausen).

Svisa Kurtonda Radio

La novaj vesperaj elsendoj, lunde, merkrede, vendrede, je la 19 - 19,10 h estas bonege aŭdeblaj.

ORF Wien

La interesaj Esperanto-informoj de ORF Regional sur meza ondo, je la 18,50 horo, ĉiun ĵaŭdon, same bonege estas aŭdeblaj, sen ĝenoj aŭ perturboj. - Ankaŭ la mallongondaj elsendoj de ORF estas nun pli kaj pli bone kapteblaj, kvankam kun ĝenoj kaj interferoj.

Varsovio. La unuaj-majaj demonstracioj, la asembleo de la packonstruantoj en Varsovio kaj la 32-a datreveno de la militfino estis dum la pasintaj tagoj la ĉeftemoj por informoj, raportoj kaj komentoj. En sia "viva" rekta raportado pri la maja demonstracio en Varsovio A. Pettyn demonstris sian reporteran kaj lingvan majstrecon. Estas bedaŭrinde, ke en la Esperanto-elsendoj oni nur malofte - post lia transiro al la finna redakcio - aŭdas tiun agrablan, sonoran voĉon. - En la pasintdimanĉa Esperanto-anguleto kadre de la germ-anlingva programo aŭdiĝis la voĉo de Barbara Pietrzak kun citaĵo el PP 17/77 pri Schwabmünchen.